

Kajeroj *el la Sudo*



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)



GUERNICA - Picasso



Nº 16 - OKTBRO - NOV BRO - DECBRO - 1992

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

Sidejo: Strato Sol, 75. E-41003-SEVILLA (Hispanio).

Prezidanto: Manuel López Hernández

Apertado 369. 41080-SEVILLA (Hispanio).

Sekretario: Alberto Franco Ramírez

Sol, 83/85. 41003-SEVILLA. (Hispanio)

Kasisto: Ramon Manau Torres

Montseny, 5.-piso. 08208-SABADELL (Barcelona) Hispanio.

Redaktoroj de la bulteno:

Antonio Marco Botella

Av. Compromiso de Caspe, 27/29. 9º. C.

50002-ZARAGOZA. (Hispanio)

Miguel Fernández Martín

C/Santa Genoveva, 58. 6º. C.

28017-MADRID. - (Hispanio)

Kovrilo: Pentraĵo "Gernika", de Paŭlo Picasso. Bonvolu legi paĝojn 16/17 de tiu ĉi numero.

ENHAVO:

Kien vi iras, Eŭropo?	3/4	pg.
Abonoj kaj kotizoj	5.	"
Eternaj reformantoj	6/7.	"
Starpunktoj antaŭ lingvo-evoluo	8/9.	"
Bonvolu ridi... sed ne trol	10/ 11.	"
La Movado en kaj ekster Iberio	12/ 13.	"
Responde al Repliko	14.	"
Lirikaj Paĝoj	15.	"
La pentraĵo "Gernika"	16/ 17.	"
Originala Prozo: Peĉa tago	18/ 19.	"
Premio por alta Liriko	20/ 21.	"
Gravedaj virinoj serĉataj	22.	"
Deziras korespondadi	23.	"

NOTO: Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.



KIEN VI IRAS, EUROPO?

Danlando faris la unuan veksigilon. Ĝia ne al Maastricht falissur Eŭropon kiel bombo, sed por multaj, ankaŭ kiel neŭtona pomo. Ĉar, kion vere signifis tiu neo? Kion, fakte, la danoj rifuzis? Ĉu la esencon mem de la unuigo aŭ la cirkonstancoj, kiel oni pretendas unuigi la Malnovan Kontinenton?

La apenaŭa venko de la jespartistoj (51%!) en la franca referendumo tremigis la fundamenton de l'Maastricht-afero kaj naskis la debaton: kian Eŭropon volas la eŭropanoj? (Kian, ni, laboristoj-esperantistoj el tiu mondo-parto?).

Aliflanke de la scenejo, sango-verŝo: Balkanio. Landoj el la eksa Jugoslavio kainas reciproke. Ho la milito! Kruele rajtigilo por senpuna murdado. Vizaĝoj trapasitaj de angoro, disŝiritaj korpoj, ruinoj: morto. Morto eĉ ĉe entombigo de la propraj mortintoj! Sovaĝeco... Ĝis kiam? Ĉu ĝis pereco absoluta? Je kiom da kilometroj for de la nunaj pozicioj oni devas loki la landlimojn por ĉesi barbari? Ĉu tio sufiĉos? Ĉu oni poste ne submetos la postrestintojn al kromosoma analizado por determini ilian gradon de serbeco, kroateco aŭ bosnieco?

Maastricht kaj Balkanio: unu ĉagreno kaj unu vundo en nia koro, unu misa kaj kaduka propono por al-

fronti la futuron kaj unu kondamninda procedo por reveni pasintjarcenten. Kontraŭ la unua, nia opono; kontraŭ la dua, nia plej elradika protesto.

Ni, hispanaj laboristoj-esperantistoj, strebadas ja al tutmonda unuiĝo, sed oponas, ke oni projektas konstrui Eŭropon desupre. "Ĉu ne konstituas, ĝuste la lastan stertoron de la antikva modernismo?" (Regis Debray, El País, 6-an de Oktobro 1992). Ni diras nen al artefaritaj kunigoj sen la eksplicita konsento -aŭ malgraŭvole- de la kunigitoj, i.a. Ĉar tiaj kreaĵoj generas monstrojn, nifojn, kiuj bumerangas kontraŭ la superstrukturon mem. Kio sekvis el USSR? Kiam ekzistis tie pli da landlimoj, pli stulta, senbrida, neracia intergenta malamo -ho! kiom da balkanioj koviĝadas ankoraŭ? -ol nuntempe? Kontraŭ la Eŭropo de la ŝtatoj aŭ nacioj ni proponas la Eŭropon de la popoloj, liberan kunmasiĝon de liberaj homoj, krisolon de kulturoj- "la plej bonaj horoj de Eŭropo estas tiuj, kiam ĝi komprenis sin mem kiel krisolon de kulturoj" (Günter Grass, El País, 19-a de Oktobro 1992-, referencon de ĉiufankaj toleremo kaj respekto. Ĝuste ĉi-cele ni esperantistas. Ne por demandi iun pri trajnhoraro aŭ hotelo -por tio ne necesas internacia lingvo-, sed por aliri ĉiujn gentojn ties mondkonceptojn, ties kulturojn, kaj alveni tiele al reciproka homeca pliriĉiĝo, al interkompreniĝo, al kolektiĝo fronte al ĉiaj mizero, ekspluatado kaj maljusto.

Ni oponas al la Eŭropo de la komercistoj, bazaro de la vanto, ŝtonkartona paradizo. Izolita. Fermita al malriĉaj alilandanoj kun la "manĝo" manĝi almenaŭ unu fojon ĉiutage, kun la pretendo manĝi la restaĵojn el niaj tabloj. Ene de ni doloras, indignigas nin, la tragedio de la afrikanoj alvenantaj al Eŭropo tra ties sudaj landlimoj: Hispanio. Centoj da Post ĝisosta enŝuldiĝo, post mil odiseadoj en amase okupitaj barkaĉoj, atendas ilin, en la plej bona okazo, repelado al iliaj landoj; ofte, drono dum naĝa baraktado por atingi la marbordon. Tia Eŭropo! Pasintjarcente ĝi koloniis -vampirishomojn el la ceteraj kontinentoj. Nun ĝi ĉirkaŭmurigas sin kontraŭ la vampiritoj. Doloras kaj indignigas nin la ĵusaj vandalaĵoj kontraŭ eksterlandanoj en Germanio...

Ni, laboristoj, oponas al konstruado de tia Eŭropo niakoste. Ja la Maastricht-traktato antaŭvidas monsisteman



unuigon pagotan je tre alta prezo -la prezo postulata de Germanio por akcepti, ke la ekuo anstataúu la markon-, nome, ke ĉiuj eúropaj landoj aliĝontaj al la unio faru el siaj monunuoj -kia ajn estu la reala stato de iliaj ekonomioj- aútentajn germanajn markojn. Kaj tio trudas eksterordinaran finanĉan rigoron, tre superan al la penado, kiu respondus al la ortodoksa kaj prudenta monpolitiko laúa al la ekonomia situacio de tiaj landoj. Sur kies ŝultroj falos tia rigoro?

Kompreneble, sur la ĉiamajn: la laboristajn. Kaj ĉi-kaze, kiel ĵus objefite, tute ne valoras la faro la kostojn de l' preparo.

Eúropo de la popoloj, do. Jen nia propono. Kompreneble, ke tiu ideo svaga, stompita, nepreciza, bezonas korpon. Trovi tiun ni, modestaj laboristoj-esperantistoj, nek pretendas, nek scipovus, sed, konsciaj pri la ideo-krizo en la viccoj maldekstrulaj -la historio subite senbridiĝis!- kaj pri la nepro serĉi solvojn konformajn al progresemlaj mondrigardoj, jen ni instigas vin, legantojn de KAJEROJ al debato.

Klaras, tamen, tio, kion ni ne volas: ian Eúropon desupre kunigitan, militojn intergentajn kaj ĉian ideologion kapablan veneni la korojn per fanatiko, neracieco aú violento.

La Redakcio.

ABONOJ KAJ KOTIZOJ

Pagis sian jarabonon niaj k-doj:

Jaime Benito Cedo	1.000,-Ptoj
Lorenzo Noguero	<u>1.000</u> - "
Sumas	<u>2.000,- "</u>

Ni petas al niaj membroj kaj abonantoj ankoraú ne pagintaj la jarabonon, tion fari, se eble antaú la jarfino. Dankon.

ETERNAJ REFORMANTOJ

Ankoraŭ inter ni estas reformantoj de Esperanto, same fervore fanatikaj kiel iliaj antaŭuloj de pasintaj jardekoj. Oni povas legi la plej freŝdatajn elcerbaĵojn de tiuj "plibonigistoj" sur la paĝoj de *Nova Provo*, la 8-paĝa oficiala organo de *NOVO* (Asocio por komuna ellaborado de Lingvo Internacia). La redaktoro, Roy McCoy, oficisto de UEA en Roterdamo, dediĉas sin al organizado de reformemuloj reprezentantaj ĉiujn nuntempajn tendencojn modifi Esperanton. Temas plejparte pri proponoj ŝanĝi la ortografion de Esperanto, jen per forigo de la supersignitaj literoj, jen per aldono de novaj diakritiloj kaj ankaŭ literosignoj por pliperfektigi la Esperantan alfabeton laŭ fonetika vidpunkto.

Sobra ekzameno de la proponoj de la malnovaj same kiel la novaj reformprojektantoj malkovras, ke ili estas klasifeblaj en du grupojn surbaze de traktato de la Fundamenta alfabeto de Esperanto kaj uzo de diakritiloj. En unu tendaro ariĝas tiuj, kiuj anatemas la supersignitajn literojn, sed ili ne ĉiuj akordas pri la maniero elimini ilin.

La plej konservativa klano akceptas uzon de la surogata alfabeto, proponita de Zamenhof mem, en kiu la litero "h" anstataŭas la cirkumflekson (ekzemple, "ch" = "ĉ", "sh" = "ŝ") kaj "ŭ" fariĝas simpla "u". Tiu ĉi alfabeto estis sporade uzata sed ĝi neniam enradikiĝis. Estis proponitaj ankaŭ aliaj surogataj alfabetoj, kiuj enhavas digramojn, formitajn per aliaj liter-paroj (ekzemple "cz" = "ĉ", "gj" = "ĝ", "kh" = "ĥ"). Estas rimarkinde, ke ne estas du reformemuloj, kiuj proponas la samajn digramojn por la tuta alfabeto.

Distancas sin de la ĉi-supraj modif-procedoj tiuj homoj, kiuj rifuzas la uzon de digramoj kaj insistas pri la baza fonetika principo, ke ĉiu litero havu nur unu sonon, kaj ĉiu sono estu indikita per nur unu litero de la alfabeto. Unu el iliaj solvoj estas aldoni al la Esperanta alfabeto la kvar literojn de la latina alfabeto, kiuj ĝis nun mankas: "q", "w", "x" kaj "y". La prononco, kiun ricevas tiuj kvar literoj, varias laŭ la kaprico de ĉiu reformanto: oni legas "q" kiel "ĉ" en unu sistemo, sed kiel "ĝ" en alia; ofte "w" anstataŭas "ŭ", sed ĝi povas havi ankaŭ la sonon de "ŝ"; "x" tre varias kaj povas esti prononcata kiel "ĵ", "ĥ" aŭ "ŝ"; "y" estas uzata de multaj aŭtoroj anstataŭ "j", sed unu donas al ĝi la sonon de "j".



Eĉ tiuj kvar novaj literoj ne sufiĉas por ĝisostaj reformistoj, do ili enkondukas pli da ŝanĝoj, inkluzive uzon de internacie konataj signoj: "ĉ" (cendo) = "ĉ"; \$ (dolaro) = "ŝ".

La plej lasta rimedo de la senĉapeligantoj de la Esperanta alfabeto estas substitui novajn vortojn al tiuj havantaj supersignitajn literojn. Zamenhof utiligis tiun procedon en sia reform-projekto de 1894 (ekzemple, "burgono", "ĝis" kaj "paĝo" fariĝis respektive "botono", "ad" kaj "pagino").

En la dua tendaro de reformemuloj estas tiuj, kiuj tute ne timas diakritilojn, do por "plibonigi" la Esperantan alfabeton ili ne hezitas altrudi ĉiuspecajn super- kaj subsignojn kaj eĉ novajn literojn. Ja estas strange, ke tiuj homoj forgesis, ke la kialo de plej feroca oponado kontraŭ Esperanto en la pasinteco, estis la malfacileco komposti kaj tajpi tekstojn kun supersignitaj literoj. La aŭtoro de unu el la projektoj enkondukas uzon de "Ĉ" (= "c") kaj de "Ĵ" (litero de la Internacia Fonetika Alfabeto: = ĵ), kiun li devas tajpi per la numero "3". En liaj tekstoj troviĝas "cirkonstanĉoj" kaj "bonaĴo". Eĉ pli bizara estas la aspekto de la sekva frazo kun tuta rozario da "subhokigitaj" literoj.

"En sia komenta fazo la ĝenia kreazaĵo de Zamenhof ja (tute prave) tselis la kutim-uzan lingvaĵon-por ĉblici senperan komunikadon inter ordinaraj homoj, trans landlimoj".

Ŝajnas, ke al la verkinto de tiu reform-projekto vere okazis "krak' en la kap'".

Estas ja certe kiel duoble du kvar, ke ĉiuj reformemuloj pli-malpli frue tiros siajn projektojn kun si en la tombon. Tiel okazis sen iu ajn escepto en la pli ol centjara historio de Esperanto.

Iom flanke de la kutimaj reform-tendencoj estas ortografia strangaĵo, aperanta en verkoj de du parolantoj de la kastilia lingvo, kiuj pro iu obskura kialo volas trudi al Esperanto interpunkciajn trajtojn, karakterizajn de la skribmaniero de la hispana. El fora Argentino originalulo nomata Ergoto de Boero (pseŭdonimo de Adán Hryniewicz) surpaperigas frazojn kiel la sekvajn:

¿Kiel vi kuraĝas diri tion...?

¡Preskaŭ nekredbla afero! ¿ĉu ne?

Saltas al la okuloj la renversitaj demand-kaj krisignoj ĉe la komenco de la Esperantaj frazoj, same kiel okazas en kastililingvaj frazoj. Nu, ne nur tiu poldevena argentinano tiumaniere modifas Esperanton. Ankaŭ pli proksime, en Hispanio, troviĝas homo, kiu sekvas la saman vojon; li estas neniu alia

ol Antonio Alonso Núñez, la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio. El "Kajeroj el la Sudo" (n-ro 13, 1992) mi ĉerpis jenajn frazojn, en unu el kiuj, la vorto "kŝom" aperas kun diakritilo.

¡Kŝom multe ili sukcesis fari, kŝom da kvalito ili donacis al ni! (pĝ. 9)

¡La defio ne estas triviala! (pĝ. 10)

Bedaŭrinde Don Antonio ne degnas klarigi la kialon de sia anomalia ortografio, kaj la redakcio de la revuo nur piednote atentigas, ke ne temas pri tajperaroj sed pri vola uzado fare de la aŭtoro de la peco.

Bernard GOLDEN

STARPUNKTOJ ANTAŬ LINGVO-EVOLUO

La lukto kontraŭ la lingva evoluo estas perdota batalo. Tion asertas lingvistoj kaj pravas historio. Tiun principon, kiu laboras de kiam lingvoj naskiĝis, povas nun bari eble la graveco de la amaskomunikiloj kaj disvolvo de la fremdlingva instruado, pro tio ke ili bezonas stabilan normlingvon (precipe ĉe la skriba medio). Pri Esperanto mi ne kuraĝas paroli, ĉar la manko de perspektivo kaj ĝia aparta naturo postulas ke oni ne traktu la



aferon sub samaj kondiĉoj kiel por aliaj lingvoj; sed tamen la fama svisa lingvisto, Ferdinand de Saussure ja aŭdacis vortigi: "...tiu ĉi principo devas pruviĝi eĉ en la kazo de la artefaritaj lingvoj. La kreanto posedas la lingvon dum ĝi ne disvastiĝas; sed de la momento kiam ĝi plenumas sian rolon kaj iĝas komuna afero, oni ne povas ĝin regi plu. (...) Ĉu Esperanto eskapos el la fatala leĝo? (...) Ĝi disvolviĝos per leĝoj malsamaj ol tiuj de la pripensata kreado kaj oni ne plu povos retroiri".(1)

Pri Esperanto do sufiĉu provizora la Saussure-aj vortoj kaj jen ni transiru al trarigardo de l'konsideroj pri la lingvo-evolua fenomeno, kiu ŝajnas necesa de natura vidpunkto (ĉio naskiĝas, kreskas kaj laste mortas) sed neŝatata, nekonvena, obstaklenda de socipolitika starpunkto. Kiam lingvo atingas la tiel nomatan literaturan maturecon, sin montras ia klopodo ĝin konservi tia kia ĝi aperas en difinita sinkrona momento. La stat-lingvoj fontas el fiksitaj

normoj, jen bazitaj sur la lingvo de la komunumo kiu maturigis sian literaturon (kazo de la toskana), jen sur tiu de la politike reganta komunumo (kazo de la kastilia) aŭ jen sur lingvo en kiu doniĝas ambaŭ faktoroj (la Chaucer English). Estas interese konstati kiel la ekzisto de politike stabila ŝtato ŝajnas decide roli ĉe la fiksado (aŭ trudado) de difinita lingvo-formo.

Se reveni al nia punkto pri konservismo, ĉu tian agon oni povas teni porĉiame? La konservistoj asertas ke jes, sed pro manko de perspektivo ili ne rimarkas ke malgraŭ ilia sinteno la lingvo fakte ŝanĝiĝadas, ĉar natura fenomeno, la lingvo ne povas esti regata de malmultaj manoj kiuj decidu ĉu ĝi estu tia aŭ alia en certa punkto de



sia evoluo. La lingvon regas ĝiaj parolantoj, kiel senkonscia forto kiu agadas iompostioje sur ĝi. Konservismo estas do senutila, kaj plejofte malutila sinteno, ĉar kreas antaŭjuĝojn kaj la senton de malĝusta lingvo en la parolantoj kiuj, pro diversaj kialoj (uzo de alia dialekto aŭ socia registro), apartiĝas de la lingvaĵo trudita de la konservistoj kiel **ideala**.

En niaj propraj lingvoj ni troviĝas do en iaspeca **dulingva** situacio (lingvistike konata kiel **diglosio**); oni konas la fantoman normon (de oni ne aktive uzatan) kaj oni parolas sian propran lingvon. Por kompreni, ekzemple, la hispanan lingvon de filmo, klera andaluzo devas koni vortojn kiaj **peonza**, **regaliz**, **tiesto**, **punta**, ktp., kvankam li uzus aliajn en sia normala parolo.

Lingvoj do evoluas laŭ multaj vojoj kiuj eskapas al konservemuloj. La parola lingvo de la geografiaj dialektoj iĝas ĉiam pli malproksima de la norma. La vortaroj de la fakaj kaj sociaj ĵargonoj kaj slangoj kreskas geometrice, ĉar se la naturo ŝanĝiĝas, ankaŭ la lingvo ŝanĝiĝas. Antaŭ tiu tohuvoĥuo la konservisto povas nur verki senesperajn artikolojn sur la paĝoj de iu digna ĵurnalo...

Alberto FRANCO

(1) Esperantigo el *Cours de linguistique générale*, Ferdinand de Saussure, Payot; Paris, 1986; p. 111.

Vera anekdoto en televido

En televida konkurso la intervjuisto demandas al konkursantino:

-Kiom da infanoj vi havas, sinjorino?- Misaŭdinte, ŝi pensas, ke li demandas pri ŝia aĝo, kaj tuj respondas:

-Mi havas 45.

-Mirinde! ĉu vi havis ilin po 4?

Ankoraŭ pli konfuza, la konkursantino respondas:

-Ne tiom flatu min, sinjoro, mi ja havis ilin unu post alia!

Dum ekzamenoj

Konversas du knabetoj dum ekzamenoj kaj unu diras al la alia:

-Mi povis skribi eĉ ne unu vorton!

-Ankaŭ ne mi!. Sed tio estas ja terura, ĉar eble niaj instruistoj pensos, ke ni kopiis unu de la alia!

Kaj la knabetoj cerbumis, kiel solvi tiom malfacilan problemon!

Surtera aer-bapto

Maljuna sinjoro entuziasmiĝas dum sia aer-bapto kaj esprimas tian fervoron uzante ĉiajn topikojn. Jam de la eniro en la aviadilon, li miras pri ĉio kaj daŭre babilas kaj babilas. Fine li ekkrias:

-Ho, rigardu malsupren! la homoj ŝajnas formikoj!

Oni klarigas al li:

-Sinjoro, ili estas formikoj. Ni ankoraŭ ne ekflugis.

Kurioza banko-sturmo

Oni aŭdas teruran bruon, kiam homo kun elefanto eniras en bankon. La homo tondre krias kun perforta tono:

-Neniu moviĝu, ĉi tio estas bankosturmo!

Bonvolu ridi



Sed ne tro!

Hurlas alarmsgnalo, la polico venas kaj arestas la bank-steliston. Scivolema, la poliestro konversas kun la originala rabisto pri la malfacilo de lia entrepreno, pro la uzado de elefanto por tiu sturmo, kaj admire diras al li:

-Ho, kiom malfacila devis esti por vi mastrumi elefanton tiucele, ĉu ne?

La rabisto tuj respondis:

-Ha, tute ne!, tio vere malfacila estis ŝtrumpi la kapon de la elefanto, por ke neniu rekonu ĝian vizaĝon!



Kredindeco inter profesiuloj

Du homoj konversacias pri la kredindeco de la diroj venantaj de personoj dum ties respektiva profesia funkciado. Unu el ili diras:

-Mi kredas nur la duonon, mi ja estas advokato.

-Tute male, mi kredas la duoblon, ĉar mi estas fiska inspektoro!

Konsolo ne konsola

Pensiulo vizitas kamaradon grave malsanan en hospitalo de la sociala asekuro kaj, ĉar tiu plendas pri la kuracistoj, servoj kaj, ĝenerale, pri ĉio, la vizitanto intencas konsoli la amikon:

-Ne plendu! Mia problemo estas ankoraŭ pli bedaŭrinda ol la via. Mi kotizis pli ol 50 jarojn kaj ankoraŭ mi ne malsaniĝis!

M^a Fernanda



La Movado en kaj ekster Iberio.

Kaŭno. Post 50 jaroj da diktaturo, en Litovio okazis la 65-a SAT-kongreso en Kaŭno. Ĝi estis do, krom Esperanto-kongreso, ankaŭ grava festinda evento, ĉar retroviĝo de esperantistoj el Orient- kaj Okcident-Eŭropo. Libero kaj amikeco ĉiam ja celebrindas.

Malfermis la kongreson la prezidanto de Litova Esperanto-Asocio, Povilas Jegorovas, kiu estis ankaŭ la prezidanto de O.K.K. Ĉeestis en la kongresinaŭguro elstaraj lokaj kaj ŝtataj aŭtoritatuloj, inter ili la vicprezidanto de la Parlamento de Litova Respubliko, Kazimieras Motieka, kiu, en flua Esperanto salutis la kongresanaron per jena trafa parolo: "Nur la fakto, ke dum Sovetia Diktatora reĝimo Esperanto estis konsiderata kiel danĝera politika krimo, montras, ke tiu ĉi lingvo estas vera rimedo de demokratia komunikado. Tial gardu kaj flegu ĝin".

La kongreso daŭris 10 tagojn, okazis 24 prelegoj, 5 SAT-kunvenoj, 3 tuttagaj ekskursoj... Resume, vere tre riĉa kaj varia programo kun kontentiga partopreno.

La venontjara SAT-kongreso okazos en Kazanlak, Bulgario, do denove en Orient-Eŭropo, trafa decido, ĉar gravas tiu alproksimiĝo kaj ofteco de kontaktoj Oriento-Okcidento kiel celo por unueca laborista movado. Estis aprobita jena



DEKLARACIO:

"La 65-a SAT-kongreso, okazinta en Kaŭno de la 5/8/ ĝis la 15/8/92

kun 617 aliĝintoj el 30 landoj:

1) Solidaras kun la streboj de ĉiuj popoloj al memdecido pri siaj aferoj kaj samtempe postulas, ke

a) en tiu procezo la rajtoj de ĉiuj estu respektataj;

b) en ĉiu lando ĉiuj loĝantoj ĝuu la samajn rajtojn, sendepende de nacieco, lingvo aŭ alia distingilo kaj asertas, ke

c) nur uzado de Esperanto povas certigi lingvan egalecon.

2) Konstatas, ke en la ŝtatoj, antaŭe nomataj socialismaj, kreiĝis situacio, malfavora al la salajruloj kaj alvokas al la solidareco kun la nunaj kaj estontaj bataloj de la laboruloj kontraŭ negativaj konsekvencoj de la transiro al la merkatekonomio.

Ni ankaŭ atentigas, ke en la landoj kun jam delonge ekzistanta "libermerkata ekonomio" la situacio malboniĝas kaj postulas kreskon de solidareco por ke la bonstato de la laboruloj almenaŭ ne malkresku.

3) Alvokas al kiel eble plej larĝa kunagado de ĉiuj demokratoj kontraŭ rasismo kaj ŝovinismo, kiuj kontaĝas nuntempe multajn landojn.

Namur.- Peto al kunlaboro.

Celante plibonigi la agadon en sindikataj medioj, oni bezonas esperantigi la deklingvan "Glosaro de la labormondo kaj de la Sindikata Movado", kiun eldonis la Eŭropa Komisiono.

La homoj pretaj al kunlaborado en tiu tasko sin turnu al: FGTB-Esperanto, 3, rue des Brasseurs, B-5000 NAMUR (Belgio)

Parizo.- Jam aperis la ĉi-jara "Sennacieca Revuo" 1992, kiel kutime kun tre riĉa beletra kaj socia enhavo. Kunlaboris en tiu ĉi kajero: N.Berdichevsky, Marjorie Boulton, Aldo de Giorgi, Arai Tomie, Molnár Mihály, Hori Yasuo, Venelin Mitev, Krys Ungar, Hans Rodewig, A. Marco Botella, Bernard Golden.

Tre interesa revuo nepre leginda. Mendu ĝin tuj ĉe la Centra Oficejo de SAT, Avenuo Gambetta, 67. F-75020-PARIS. Francio.

NEKROLOGO.- Kun bedaŭro ni komunikas al niaj k-doĵ la forpason de la edzino de k-do Victor Ortiz, nia bona amiko kaj prezidanto de la zaragoza esperantista rondo.

Kun identa doloro ni informas pri la forpaso de D-ro José Olavide, fidela abonanto de nia revuo. Nian kondolencon al ambaŭ familioj.

RESPONDE AL REPLIKO



Al la Redaktoro de "KAJEROJ EL LA SUDO".

Rilate al mia artikolo pri Juan NEGRIN, "Kajeroj" numero 14, mi intence ne parolis pri lia rolo dum la jaroj 1937-39, ĉar mi scias la argumentojn kaj polemikojn, kiuj, ankoraŭ hodiaŭ, abundas rilate al la tiama Ĉefministro. Mi ankaŭ sufiĉe bone konas la opinion de multaj homoj, "ke li estis la marioneto inter la manoj de la hispana komunista partio", kiel skribas k-do Yves Peyraut. Mi ne nur legis la tri librojn de li menciitajn, sed pli ol tridek pri la hispana intercivitana milito...

Ĉu vere Negrin estis marioneto de Stalino, aŭ ĉu li vidis, kiel multaj aliaj, ke Sovetunio estis la sola ŝtato, kiu pretis helpi la Respublikon? Negrin kaj multaj ne-komunistoj komprenis tion, kaj ili, iom kontraŭvole, akceptis la postulojn de la partianoj.

Ĉu k-do Peyraut kredas, ke la Respubliko povintus rezisti tiel longe sen la helpo de Sovetunio? Negrin rompis siajn rilatojn kun la hispana komunista partio en 1943. Malmultaj homoj legis la interŝanĝitajn leterojn, ne vaste diskonigitajn de la koncernaj verkistoj, inter ambaŭ partoj, eble ĉar oni konsideris ke 1943 ne ŝajnis oportuna tempo por tiuj disputoj. Ĉu tiuj leteroj troviĝas, eble, inter la 168 dokumentoj transdonitaj al la hispana ambasadoro en 1956?

La milito finiĝis antaŭ pli ol kvindek jaroj, kaj mi opinias, ke jam estas tempo por pritrakti la eventojn per raciaj studoj kaj sen emociaj akuzoj.

Amador DIAZ

LIRIKAJ PAĜOJ

vi

vi estas mia
via haŭto
viaj poroj
viaj glandoj
via ŝvito
viaj spiroj
viaj vioj
via tuto
tuta vio

nun
kaj ose

ĝibe falte

laŭ nepra nepro
orakole nia

ambique

kuŝe kaŝaj
homoj hume
fuke fakaj
mire moraj
dure diraj
time temaj
vorton vartas
fikologo



Salnevo

LA PENTRAĴO "GERNIKA", DE PICASSO



La fama pentraĵo "Gernika", de Picasso, la plej alta interpreto-esprimo de la hororo de la intercivitana hispana milito, estis antaŭ ne longe translokita al la nova Muzeo pri Moderna Arto "Reina Sofia" de Madrido kaj, kiel okulfrapa stelo de tre interesa kaj bela kolekto, inaŭgurita antaŭ kelkaj tagoj en sia nova ekspoziciejo sub la titolo kolektiva de plej elstara pentroarto de la nuna jarcento.

La translokiĝo okazis post arda diskutado pri la konveno aŭ ne de la lokoŝanĝo,

pri la respekto al la esprimita lasta volo de la forpasinta aŭtoro de la pentraĵo tiurilate kaj, fine, pri la eventuala trafo de la decido kadri ĝin inter la elektitaj pentraĵoj plej famaj de ĉi moderna epoko, anstataŭ esti ekspoziciata tute aparte, kiel ĝis nun. Mi ne eniros en tiun bizancisman debaton, ĉar mi ne konsideras tion speciale interesa por niaj legantoj, tamen mi opinias oportuna komenti kelkajn el la valoroj de la pentraĵo, laŭ mia opinio ne sufiĉe konataj kaj tial komentindaj.

La bildaro en "Gernika", olepentrita blanka-nigra, inspiriĝis el la bombardado de vaska urbo tiel nomata, fare de la nazia germana aerarmeo dum la intercivitana hispana milito. Picasso skizis ĝin la unuan de majo de 1937, apenaŭ

oni eksciis pri la terura masakro de la gernika popolo kaj detruo de la urbeto, kaj finis ĝin je la komenco de la sekvan-ta monato, junio. Ĉar la pentraĵodimensioj estas 3,50 x 7,82 m. tio tute simple signifas, ke la pentristo laboradis tre inten-se montrante la pasion kaj idealismon, kiujn li metis en la realigon de tiu arta verko.

En la pentraĵo videblas (de dekstre maldekstren) la jenaj scenoj: virino kun la brakoj alten levitaj pafas sin for el domo en flamoj; alia virina figuro ekkuras al la centro de la tolaĵo, super ŝi aperas ene de fenestro la kapo kaj brako de alia virino, kiu tenas petrolampon; sur la centro ĉevalo mortadas, pikilo penetras ĝiadorsen, inter ĝiaj kruroj aperas dismembrigita kadavro de soldato ankoraŭ svinganta rompitan glavon; sur la maldekstra ekstremo, virino tenas en siaj brakoj mortintan infanon; antaŭ ĉi figuro aperas taŭro rigardante triumfe la scenon; inter la kapo de tiu ĉi kaj tiu de la ĉevalo flugas birdo kun la beko preskaŭ aperta kaj angora esprimo; prezidas la tuton la noktokulo -la pupilo estas elektrolampo- sur la kvarangula vertico de la impresa pentraĵo.

La sinteno de la figuroj -interesa kompendio de la kubisma artskolo-, kaj eble ties fragmenta situo sur la tolaĵo, donas al la pentraĵo paroksisman patoson, kiu akcentas la kvazaŭmovon de tiuj figuroj kaj kreas la etoson de la dramo, kiu emanis la tuta verko. Multaj detaloj de tiu ĉi pentraĵo devenas el aliaj gravaj verkoj de Picasso mem.

Vere, la pentraĵo "Gernika" profunde impresas, precip-e pro la eksplodo de violento, kiun ĝi esprimas, la drama sinteno de ĝiaj figuroj kaj la vigleco de ĉiuj detaloj kaj nuancoj en ĝi, eĉ la plej signifikaj: temas pri bildoj tre vivaj, kiuj donas humanan mesaĝon en sinteno despera, oni diras, ke preter la propra arto, ĉar, kiam oni rigardas ĝin, oni havas la sensacon, ke ni estas ne antaŭ pentraĵo, sed antaŭ tragedio reala. Tiel sentive oni restas kaptita de la artaĵo.

Kompreneble, verko tiel grava kiel "Gernika" havas studindajn esencojn indajn je multifacetaj komentarioj. Ĝi, kie ajn oni ĝin lokos aŭ ekspozicios, brilos ĉiam kiel ĝi me-ritas: certe kiel unu el la pentraĵoj plej elstaraj el la Uni-versala Arto.

A.Marco Botella



Peĉa tago

Ĉu vi neniam sentis vin persekutata de misfortuno? Ĉu vi neniam spertis la senton kvazaŭ la tuta mondo inside komplotus kontraŭ vi? Nu, io tia okazis al mi hieraŭ.

En la oficejo, la tutan tagon mi ŝvitis kaj mishumoris, ĉar la aferoj tute ne volis iri glate. Verdire, jam de pluraj tagoj mi sidis en laboro ĝis super la oreloj. Tamen hieraŭ, mi ne scias kial, ĉio staris sur la kapo kaj mi devis barakti, kiel fiŝo ekster

la akvo, por finredakti unu el tiuj gravaj, seriozaj kaj konsiderindaj raportoj, kiujn fakte neniu legas. Jes, sendube, ĉio misis. Eĉ mia kara direktoro, pedanto pli teda ol kulo, decidis fordoni sin per korpo kaj animo al la praktikado de sia plej ŝatata sporto, tio estas inciti al mi la galon.

—Eminenta kaĉo, sinjoro Braun —li ĉikanis, foliumante la raporton.

—Ĉu tubero? —mi demandis pikite.

La ceteron de la konversacio mi indulge ŝparas al vi. Tamen notu bone, ke, aŭdinte mian argumentadon, li subtile montris al mi, kiu kondukas la dancojn.

—Ĉu el viaj vortoj, sinjoro Braun, mi devas konjekti, ke vi ne plu kontentas ĉe nia Kompanio?

Kiel sciante, por saĝulo sufiĉas aludo; do, mi metis finon al mia latino kaj bele dancis laŭ lia fajfilo.

Mirakle, jes, nur mirakle, mi ne dronis en maro el adrenalino.

Feliĉe, je la deka kaj dek en la vespero, la tasko estis preta, kaj mi pafis min for el la oficejo.

Profunde laca, malsata kiel lupo kaj ĉagrenita de terura kapdoloro, mi aŭtis hejmen tra la kutima ĝangalo da semaforoj, kamikazaj taksioj kaj senfinaj obstrukcoj. Nur zena sinteno helpis min atingi la varmon de la dolĉa

hejmo, kie la longe sopirata etoso familia sukcesis sufoki, definitive, la lastan eron - de mia pacienco.

—Kvin antaŭ la dekunua — salutis Flora, mia edzino. — De kie vi venas? Nu, ne, ne diru, mi konas parkere vian litanion: la laboro, la direktoro, la trafiko, la ko, la to kaj la po, ĉu ne? Dum Flora, la kompatinda Flora, atendas, varmigas la manĝon, atendas, varmigas la manĝon, ade kaj re, unu fojon kaj alian ĝis la rizo ŝajnas betono.

Mi eksplodis kiel kermesa raketo.

—Fermu la faŭkon, Flora! Ne tedu min plu!

Kaj, anstataŭ prudente kateni la langon en la buŝo, mi stulte punis mian malplenan stomakon, aldonante:

—Mi ne volas manĝi. Mi ne malsatas kaj punkto.

Ho, kiom mi bedaŭris poste ĉi malsaĝajn vortojn. "Kia kaĉo!" mi pensis, evidente influita de mia subkonscio.

Baf, kial daŭrigi, verŝajne la ceteron de ĉi vigla kaj ne tro edifa epizodo vi povos mem konstrui el via propra sperto, ĉu ne?

Nu, en la lito, silento, dorso kontraŭ dorso ĝis, plene elĉerpita, mi havis la fortunon endormiĝi je la... ba, ne plu gravas!

Ĉirkaŭ la kvara nokte koŝmara songo vekis min. Flora ne kuŝis apude, kaj preskaŭ senpripense mi ellitiĝis.

Lumo venis el la kuirejo, kaj jen tie mi trovis ŝin ĉe la fornelo.

—Kion vi umas? Estas la kvara nokte.

Ŝi rigardis min kun aspekto de forlasita hundo. Ŝiaj okuloj brilis de larmoj.

—Mi kuiras torton el ĉokolado.

—Ĉi-hore?

—Jes, por vi. Vi tre ŝatas — ŝi diris plorsingulte, kaj fulmo traboris mian koron.

—Vi havas farumon survizaĝe.

—Kie? Ĉu...? — ŝi demandis almetante manon al vango.

—Ne. Ĉi tie! — mi diris kaj, proksimiĝante, tenere ŝin kisis sur la lipoj.

Tiam, dum ŝi torente ploris, mi streĉe brakumis ŝin.

—Flora, Flora, kiom mi stultas foje!

—Ne, ne, nur mi kulpas...

Ho, kia sceno, ŝi en subrobo kaj mi en kalsoneto, ligitaj per brakumo, meze de la nokto kaj de la kuirejo.

Hodiaŭ matene nur duobla dozo da kafo helpis min venki la dormemon. Cetere, la necesan forton por alfronti la novan tagon mi ĉerpis el granda peco da torto, kiu, kredu, ne kredu, pli ol ĉokolade gustis ame.

PREMIO POR ALTA LIRIKO



La novaĵo venis al nia Redaktejo kiam ni enkomputiligis niajn lastajn artikolojn por "KAJEROJ", kaj la komunikaĵo diris, ke Miguel Fernández Martín, nia kunredaktoro, akaparitis preskaŭ ĉiujn premiojn en la 32-aj Internaciaj Floraj Ludoj.

La premiojn oni povas listigi tiel:

1-a) Rozo por la plej bona ampoemo. Aljuĝita al lia poemo "Dua Amo".

2-a) Violo por la plej bona poemo pri temo humanisma. Aljuĝita al

lia poemo "Jen nia packolombo".

3-a) Eglanterio por la plej bona poemo pri libervola temo. Aljuĝita al lia poemo "La lasta valso".

4-a) Amarilido por la plej bona prozaĵo. Aljuĝita al lia verko "Zampo kaj Selna".

5-a) Natura Floro por la plej bona verko el ĉiuj premiitaj. Aljuĝita al lia poemo "Jen nia packolombo".

Plie, oni aljuĝis al li ankaŭ tri Honorajn Menciojn kadre de la Premioj Rozo, Violo kaj Eglanterio por liaj verkoj: "Puncas maten'", "feniksis am'", "Alvoko en tiom minora" kaj "Naskiĝoj" respektive.

Nur unu premion maltrafis nia bardo: tiu por la plej bona traduko de esperantaĵo en la katalunan, pri kiu Miguel Fernández, kompreneble, ne konkursis. Resume, oni aljuĝis al li entute ok premiojn.

Sen ajna pripenso ni, kolegoj kaj amikoj, iris al

Terrassa (Barcelono) por la beletra festo. Ja temis pri omaĝo al la persono kaj al la poezio de Miguel, kaj ni ne povis ne ĉeesti!

Permesu al mi iom komenti la cirkonstancojn de la Festo. Mi nur diru, ke ĝia prezento restis meze (ĉu meze aŭ ni devas ankaŭ forigi tiun terminon?) inter aliaj pasintaj, kiujn mi konas, kies pompa kaj tradicia ceremonio brilis pli ol la Poezio mem, kiun oni volis honorigi kaj la normalaj nunaj poezi-ceremonioj. Ne, la Festo ne estis tia, sed ankaŭ ne alitipa pli aktualigita, pli moderna kaj hodiaŭa...

Niaj katalunaj samideanoj devos nepre evoluigi, modernigi la Florajn Ludojn, kaj ili devos tion fari kiel eble plej urĝe, ne rapide sed senpaŭze, ĉar tio kion ni spektis montriĝas jam kaduka por nia nuntempo... Kial venas nun al mia memoro la Unua Lirika Festo de HEF okazinta en La Laguna honore al Régulo Pérez|. Eble tiu povus esti unu el la adoptindaj modeloj!

Kaj kion diri ne jam dirita pri la poezio de Miguel Fernández? Ĉiuj liaj verkoj prezentitaj kaj premiitaj en la Konkurso atingas pli ol kontentigan nivelon, ni diru pli bone altan nivelon: "Jen nia packolombo", ricevinta la krom-premion "Natura Floro", eble ne estis la plej bona, sed miaopinie, ĝi meritas la plej altan laŭron, ĉar oni devas aldoni al ĝiaj komunaj lirikaj valoroj la substrekindajn homamajn kaj sociajn ŝatatajn kvalitojn. La poemo estas kanto al la paco, protestokrio kontraŭ ties minacantoj:

"Paroloj ja kondamnaj
sed ne pri l' damnaj armoj
nek pri armeoj noblaj (noblaj!)
nek pri militoj justaj (justaj! justaj!)
(ĉu povas ĝusti justaj ĉe militoj?)

La granda problemo, kiam oni aŭskultas deklami plurnajn poemojn de Miguel sen la teksto enmane estas, tiu angora impreso kiu kaptas nin kvazaŭ io valora eskapus al nia kompreno, al nia kaptovolo kaj forflugus malproksimen... Temas pri samtempigo de versoj kun kadencoj ravaj, verva muziko akompananta la recitadon, ritma danco baroka de rafinita

frazologio loge eniranta en niajn orelojn, la signifo de interesa mesaĝo forrabanta nian atenton...

Tiel oni aŭdas la versojn de Miguel, sed kion fari apriore? Kion kapti prefere? Kion elekti el tiuj esprimoj harmonie venantaj al ni? Ĉu la muziko, ĉu la parolesencon, ĉu la ritmo, aŭ eble iom el la tuto? Mi konfesas mian absolutan malkapablon elsukigi la esencon de tiom da valoroj enkadritaj en tiu koncepto malfacile difinebla nomata beleco, ŝprucantaj en la forflugo de kelkaj sekundoj el la poemo... Gis kiam mi frande legos, tre malrapide, tiujn poemojn, nur unu sola impresio: belegaj!

La fespargoladon faris nia bona amiko Gonçalo Neves, ne longan, ne tedan, sen la retoriko de la iamaj Florludaj Majstroj. Neves poezias kiam parolas kaj poezias eĉ kiam li silentas. Neniu persono pli adekvata por prezidi Poezian Feston.

La Redakcio de "KAJEROJ" gratulas vin, kara amiko Miguel, pro via sukceso! Gratulon kaj dankon, ĉar kun vi sukcesis ankaŭ la POEZIO!

Antonio Marco Botella

20 GRAVEDAJ VIRINOJ SERĈATAJ POR SCIENCA ESPLORO

Pri ĉiuj grandaj naciaj lingvoj ekzistas plurvolumaj studoj pri la maniero, laŭ kiu infanoj denaske akiras tiujn lingvojn. Tiuj studoj, interalie, helpas lingvistojn kompreni multajn facetojn de la koncernaj lingvoj kaj de la evoluo de la parol-kapablo de infanoj, kiuj parolas ilin. Tiuj studoj provizas bazon, ekzemple, por verki lernolibrojn pri la koncernaj lingvoj aŭ por pluaj studoj pri infanoj kun parol-problemoj, ktp.

Prezentiĝas nun la okazo realigi ion similan ankaŭ pri Esperanto, ĉar mi mem povas utiligi la laborejon de la Universitato en Romo, en kiu oni okupiĝas pri ĝuste tiaj studoj.

Tiacele mi bezonas sekvi la lingvan evoluon de 20 infanoj, kiuj de la naskomomento estas alparolataj de almenaŭ unu gepatro en Esperanto.

La familioj, kiuj partoprenos la eksperimenton esence devos sekvi metodon evoluigitan en la roma universitato por kolekti informojn pri la lingva evoluo

de la infano. Ne estos granda laboro kaj eĉ povos temi pri pleĉa flankokupo dum la unuaj vivo-jaroj de la bebo. Temo pri notado en taglibro de la plej interesaj esprimoj de la infano (en ĉiuj lingvoj, kiujn ĝi konas), pri kolektado de vortprovizaj listoj ĉiun trian monaton kaj pri surbendigado de la ludanta infano de tempo al tempo.

Kaj nun mi donu klarigon pri la iom ŝerca titolo.

La beboj prefere estu ankoraŭ naskotaj por ke mi havu la tempon sendi la necesajn informojn al la gepatroj antaŭ la nasko. Tial mi serĉas nun gravedajn virinojn.

Tiuj virinoj povus esti esperantistinoj aŭ/kaj edzinoj de esperantistoj. En la dua kazo, kondiĉe ke la patro intencas regule alparoli la bebon en Esperanto, mi estos tre kontenta rilati kun la familio kaj enlistigi la bebon inter la studentajn infanojn.

En la unua kazo (graveda esperantistino) mi estos ege pli kontenta se la patrino mem volas paroli kun la bebo en Esperanto, dum la patro parolas la lokan lingvon.

Fakte ekzistas relative multaj denaskaj parolantoj de Esperanto. Laŭ mia takso en la nuna momento almenaŭ 200 familioj en la tuta mondo normale uzas Esperanton. Tamen tre ofte la portantoj de la internacia lingvo estas la patroj, dum la patrinoj parolas la lokan lingvon (ĝenerale tia estas la modelo en samnaciaj paroj) aŭ sian nacian lingvon (ĝenerale tio okazas en malsamnaciaj paroj, en kiu la fremda edzino loĝanta en la edzo-lando estas la nura ebla fonto por la neloka lingvo). Kvankam tio ne signifas ke la infanoj ne parolos Esperanton, aliflanke tio havas sekvojn ĉefe dum la unuaj evolu-jaroj.

Tio klarigas kial mi aparte ĝojas pri la unua kazo, sed tute kontentas ankaŭ pri la dua.

Bonvolu kontakti min (Renato Corsetti, Colle Rasto, I-00036 Palestrina, Italujo, Tel. 39-6-9575713) kaj mi tuj reagos al vi por ke mia letero atingu vin almenaŭ samtempe kun la akuŝistino.

Renato CORSETTI

Korespondi deziras

Esplorlaboranto en Esplor-Instituto de Fruktokulturo dez. kor. kun kamparanoj, se eble kanarianoj. Li interesiĝas krom pri agrokulturaj temoj, ankaŭ pri ĉio ligita al naturo, nome naturprotektado, abelbredaro, frukt-malsanoj, ktp. Adreso: Stanislav Kareš; Tylova 1262, 508.01 HORICE, Ĉekoslovakio.



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

REDAKCIO: Str. Av. Compromiso de Caspe, 26, 1ª
50002 - Zaragoza (Hispanio)

Depósito legal: Z - 2398 - 88

Presejo: Aragonesa de Reproducciones Gráficas, S.A.